**eksporti** = export | exporteren | exporter | exportovat  
**ekstera** = external | extern | externe | vnější  
**ekzemplo** = example | voorbeeld | exemple | příklad  
**eldoni** = issue (publish) | uitgeven | sortir | vydat  
**elekti** = choose | kiezen | choisir | zvolit  
**elekto** = choice | keuze | choix | volba  
**elemento** = element | element | élément | prvek  
**elira klavo** = exit key (Esc) | afbreektoets | touche échap | klávesa Escape  
**eliri** = exit | afsluiten | quitter | odejít  
**eljeti** = eject | uitwerpen | éjecter | vysunout  
**elsaluti** = log out | afmelden | se déconnecter | odhlásit se

**elŝuti** = download | downloaden | télécharger | stáhnout  
**eltondi** = cut | knippen | couper | vyjmout  
**eltondi kaj alglui** = cut and paste | knippen en plakken | couper-coller | vyjmout a vložit  
**enarkivigi** = archive | archiveren | archiver | archivovat  
**enhavo** = content | inhoud | contenu | obsah  
**eniga klavo** = enter key | Enter-toets | touche entrée | klávesa Enter  
**enigi** = enter | invoeren | entrer | vložit  
**enmemorigi** = store | opslaan | enregistrer en mémoire | zapsat do paměti  
**ensaluti** = log in | aanmelden | se connecter | přihlásit se  
**erarmesaĝo** = error message | foutmelding | message d'erreur | chybová zpráva  
**eraro** = error | fout | erreur | chyba  
**facile uzebla** = easy-to-use | makkelijk te gebruiken | simple d'utilisation | snadno použitelný  
**faksi** = fax | faxen | télécopier | faxovat  
**faksilo** = fax (device) | fax-apparaat | télécopieur | fax  
**fakso** = fax (letter) | fax | télécopie | fax  
**fallisto** = combo box | keuzelijst met invoervak | zone de liste déroulante | kombinované pole  
**fallisto** = drop-down list | uitklapmenu | liste déroulante | rozbalovací seznam  
**falmenuo** = drop-down menu | uitklapmenu | menu déroulant | rozbalovací nabídka  
**fari savkopion** = backup | een reservekopie maken | faire une copie de sauvegarde | vytvořit záložní kopii  
**fermi (dosieron)** = close (file) | sluiten (bestand) | fermer (fichier) | zavřít (soubor)  
**fini** = end | afsluiten | terminer | ukončit  
**Flash-movbildo** = Flash animation | Flash-animatie | animation Flash | Flash-animace  
**folio** = tab (page) | tabblad | onglet | panel  
**foliumi** = browse (for file) | bladeren | parcourir | procházet  
**foliumilo** = browser (internet) | webverkennen | navigateur (web) | prohlížeč  
**fona** = background | achtergrond | d'arrière-plan | na pozadí  
**fono** = background | achtergrond | arrière-plan | pozadí  
**forigi** = delete | wissen | supprimer | odstranit  
**forlasi** = abandon | afbreken | abandonner | opustit  
**grafika fasado** = graphical user interface | grafische gebruikersomgeving | interface graphique | grafické uživatelské rozhraní  
**ĝisrandigi** = align | uitlijnen | aligner | zarovnat  
**ĝisrandigo** = alignment | uitlijning | alignement | zarovnání

**grafika fasado** = graphical user interface | grafische gebruikersomgeving | interface graphique | grafické uživatelské rozhraní  
**grasa** = bold | vet | gras | tučné  
**ĝustigi** = adjust | aanpassen | ajuster | upravit  
**ĝustigo** = adjustment | aanpassing | ajustement | úprava  
**heliko** = at sign | apenstaartje | arobase | zavináč  
**identigo** = identification | identificatie | identification | identifikace  
**importi** = import | importeren | importer | importovat  
**instali** = install | installeren | installer | instalovat  
**instalilo** = installer | installatieprogramma | logiciel d'installation | instalátor  
**interreta konto** = Internet account | internet-account | compte Internet | internetový účet  
**interretaliro** = internet access | internettoegang | accès à Internet | přístup k internetu  
**Interreto** = internet | internet | internet | internet  
**interretperanto** = access provider | internetaanbieder | fournisseur d'accès internet | poskytovatel připojení  
**interŝanĝi** = exchange | uitwisselen | échanger | vyměnit  
**kablo** = cable | kabel | câble | kabel  
**kaj-signo** = ampersand | ampersand-teken | eperluette | ampersand  
**kalendaro** = calendar | agenda | calendrier | kalendář  
**kalkuli** = calculate | berekenen | calculer | vypočítat  
**kalkulilo** = calculator | rekenmachine | calculatrice | kalkulačka  
**kanalo** = channel | kanaal | canal | kanál  
**kapacito** = bandwidth | bandbreedte | bande passante | šířka pásma  
**kartoĉo** = cartridge | cassette | cartouche | kazeta  
**kasedo** = cassette | cassette | cassette | kazeta  
**kaŝkopio** = blind carbon copy | verborgen kopie | copie carbone invisible | skrytá kopie  
**kaŝmemoro** = cache | cachegeheugen | mémoire cache | rychlá vyrovnávací paměť  
**katalogo** = catalog(ue) | catalogus | catalogue | katalog  
**kategorio** = category | categorie | catégorie | kategorie  
**kazostudo** = case study | praktijkstudie | étude de cas | případová studie  
**KD** = compact disc | compact disc | disque compact | kompaktní disk  
**KD-legilo** = CD player | cd-speler | lecteur de CD | CD-přehrávač

**KD-registrilo** = CD writer | cd-schrijver | graveur de CD | vyalovaĉka CD  
**klaso** = class | klasse | classe | třída  
**klavaro** = keyboard | toetsenbord | clavier | klávesnice  
**klientkomputilo** = client (computer) | client | client (informatique) | klient  
**kliento** = customer | klant | client | zákazník  
**klientnumero** = client number | klantnummer | numéro de client | číslo klienta  
**klimatizilo** = air conditioning | klimaatregeling | climatiseur | klimatizace  
**kodo** = code | code | code | kód  
**kodompisto** = cracker | cracker | cracker | cracker  
**kodumulo** = hacker | hacker | hacker | hacker  
**kolora presilo** = color printer | kleurenprinter | imprimante couleur | barevná tiskárna  
**kolumno** = column | kolom | colonne | sloupec  
**kolumnolarĝo** = column width | kolombreedte | largeur de colonne | šířka sloupce  
**kolumnosalto** = column break | kolomeinde | saut de colonne | zalomení sloupce  
**kolumnotitolo** = column heading | kolomhoofding | en-tête de colonne | hlavička sloupce  
**komanda linio** = command line | opdrachtregel | ligne de commande | příkazový řádek  
**komando** = command | opdracht | commande | příkaz  
**kombinaĵo** = combination | combinatie | combinaison | kombinace  
**komento** = comment | opmerking | commentaire | komentář  
**komo** = comma | komma | virgule | čárka  
**kompari** = compare | vergelijken | comparer | porovnat  
**kompili** = compile | compileren | compiler | přeložit  
**kompililo** = compiler | compileerprogramma | compilateur | překladač  
**komputi** = compute | berekenen | calculer | počítat  
**komputila administranto** = computer administrator | computerbeheerder | administrateur de l'ordinateur | správce počítače  
**komputila karto** = extension card | insteekkaart | carte d'extension | rozšiřující karta  
**komputila konto** = computer account | computeraccount | compte d'ordinateur | počítačový účet  
**komputila labortablo** = desktop | bureaublad | bureau | pracovní plocha  
**komputila reto** = computer network | computernetwerk | réseau informatique | počítačová síť

**komputilo** = computer | computer | ordinateur | počítač  
**komputilujo** = case (hardware) | behuizing | boîte | skříň  
**komputilujo** = computer case | computerbehuizing | boîtier | počítačová skříň  
**koncepto** = concept | concept | concept | koncept  
**kondiĉa** = conditional | voorwaardelijk | conditionnel | podmíněný  
**kondiĉa aranĝo** = conditional formatting | voorwaardelijke opmaak | mise en forme conditionnelle | podmíněné formátování  
**kondiĉo** = condition | voorwaarde | condition | podmínka  
**konecti** = connect | verbinding maken | se connecter | připojit (se)  
**konekto** = connection | verbinding | connexion | připojení  
**konfidenco** = confidentiality | vertrouwelijkheid | confidentialité | utajení  
**konfirmi** = confirm | bevestigen | confirmer | potvrdit  
**konflikto** = conflict | conflict | conflit | konflikt  
**kongrua** = compatible | compatibel | compatible | kompatibilní  
**konservi** = save (data) | opslaan | enregistrer | uložit  
**konto** = account (data) | aanmeldgegevens | compte | účet  
**kontrakto** = contract | contract | contrat | smlouva  
**kontraŭspamilo** = anti spam | ongewenste berichtenverwerking | anti-spam | antispamový filtr  
**kontroli** = check (general) | controleren | contrôler | zkontrolovat  
**kontrolobito** = check | controle | vérification | kontrolní bit  
**konverto** = conversion | omzetting | conversion | převod  
**kopii** = copy | kopiëren | copier | kopírovat  
**kopii kaj alglui** = copy and paste | kopiëren en plakken | copier-coller | kopírovat a vložit  
**kopiilo** = copier | kopieermachine | copieur | kopírka  
**kopio de mesaĝo** = carbon copy | kopie | copie carbone | kopie  
**kraŝi** = crash (computer) | vastlopen | se planter | zhroutit se  
**krei** = create | aanmaken | créer | vytvořit  
**kromprogramo** = add-in | invoegtoepassing | complément | rozšíření  
**kromsigno** = accent | accentteken | accent | diakritické znaménko  
**kuketo** = cookie | traceerbestand | témoin (de connexion) | cookie  
**kunligi** = attach | bijvoegen | joindre | přiložit  
**kunlokigado de ekipaĵo** = colocation | colocation | kolokace

**kunmeto** = concatenation | samengevoegde tekst | concaténation | zřetězení  
**kunsendaĵo** = attachment | bijlage | pièce jointe | příloha  
**kursoro** = cursor | muisaanwijzer | curseur | kurzor  
**larĝkapacita** = broadband | breedband | large bande | širokopásmový  
**larĝkapacita konekto** = broadband connection | breedbandverbinding | connexion haut débit | širokopásmové připojení  
**larĝkapacita reto** = broadband network | breedbandnetwerk | réseau haut débit | širokopásmová síť  
**legosigno** = bookmark | bladwijzer | signet | záložka  
**ligilo** = hyperlink | koppeling (website) | lien hypertexte | odkaz  
**limdato** = deadline | (vooropgestelde) termijn | date limite | uzávěrka  
**limigo** = constraint | beperking | contrainte | omezení  
**Linukso** = Linux | Linux | Linux | Linux  
**litercifera** = alphanumeric | alfanumeriek | alphanumérique | alfanumerický  
**literumilo** = spelling checker | spellingcontrole | correcteur | kontrolor pravopisu  
**lokokupilo** = placeholder | tijdelijke aanduiding | espace réservé | rezervované místo  
**majuskla baskulo** = caps lock | kapitalen vergrendelen | verr. maj | klávesa Caps Lock  
**Makintoŝo** = Macintosh | Macintosh | Macintosh | Macintosh  
**malaktivigi** = deactivate | desactiveren | désactiver | deaktivovat  
**malfragmentiĝo** = defragmentation | defragmentatie | défragmentation | defragmentace  
**malfrua** = overdue | achterstallig | en souffrance | nevyřízený  
**malgarantio** = disclaimer | vrijwarings-clausule | clause d'exclusion de responsabilité | vyloučení odpovědnosti  
**malinstali** = uninstall | verwijderen (van de computer) | désinstaller | odinstalovat  
**mallongigi** = abbreviate | afkorten | abréger | zkrátit  
**mallongigo** = abbreviation | afkorting | abbréviation | zkratka  
**malplena** = empty | leeg | vide | prázdný  
**malsimetria** = asymmetric | asymmetrisch | asymétrique | asymetrický  
**malsuprenstreko** = backslash | omgekeerde schuine streep | barre oblique inverse | zpětné lomítko  
**malsuprenstreko** = backward slash | omgekeerde schuine streep | barre oblique inverse | obrácené lomítko

**malvalidigi** = disable (login) | blokkeren (van gebruikersnaam) | désactiver | zablokovat (přihlášení)  
**malvalidigita** = disabled | geblokkeerd | désactivé | zakázaný  
**malvarmigilo** = cooler | koeler | refroidissement | chladič  
**memoro** = memory | gehuegen | mémoire | paměť  
**misuzo** = abuse | misbruik | abus | zneužití  
**movbildo** = animation | animatie | animation | animace  
**muso** = mouse | muis | souris | myš  
**nelokdependa komputado** = cloud computing | cloud computing | infonuagique | cloud computing  
**nesinkrona** = asynchronous | asynchroon | asynchrone | asynchróní  
**nombri** = count | tellen | calculer | počítat  
**nuligi (ordonon)** = escape | afbreken | annuler | zrušit  
**oftaj demandoj** = frequently asked questions | veelgestelde vragen | foire aux questions | časté otázky  
**okupita** = busy | bezet | occupé | obsazený  
**operaciumo** = operating system | besturingssysteem | système d'exploitation | operační systém  
**organizaĵo** = organization | organisatie | organisation | organizace  
**panei** = crash (network) | platgaan | être en panne | vypadnout  
**pasvorto** = password | wachtwoord | mot de passe | heslo  
**pelilo** = driver | stuurprogramma | pilote | ovladač  
**pepaĵo** = tweet | tweet | message envoyé via Twitter | tweet  
**perkomputila** = computer-aided | computer-ondersteund | par ordinateur | počítačový  
**perkomputila eldonado** = desktop publishing | computer-ondersteunde publicatie | publication assistée par ordinateur | tvorba tištěného dokumentu za pomoci počítače  
**perkomputila fasonado** = computer-aided design | computer-ondersteund ontwerpen | mise en page assistée par ordinateur | počítačem podporované navrhování  
**permesi** = allow | toestaan | permettre | povolit  
**permesilo** = licence | licentie | licence | licence  
**persona** = personal | persoonlijk | personnel | osobní  
**plenigi** = fill | opvullen | remplir | vyplnit  
**plenumebila dosiero** = executable file | uitvoerbaar bestand | fichier exécutable | spustitelný soubor  
**plenumi** = execute | uitvoeren | appeler (le logiciel) | provést

**pli** = more | meer | autres | více  
**plirapidigi** = accelerate | versnellen | accélérer | zrychlit  
**plirapidigo** = acceleration | versnelling | accélération | zrychlení  
**plurtaskado** = multitasking | multitasking | multitâche | víceúlohové zpracování  
**podkasto** = podcast | podcast | baladodiffusion | podcast  
**poŝkomputilo** = handheld computer | zakomputer | assistant numérique personnel | kapesní počítač  
**poŝmemorilo** = USB stick | USB-stick | clé USB | USB flash paměť  
**praŝarga disko** = boot drive | opstartstation | lecteur de démarrage | zaváděcí jednotka  
**praŝarga dosiero** = boot file | opstartbestand | fichier de démarrage | zaváděcí soubor  
**praŝarga subdisko** = boot partition | opstartpartitie | partition de démarrage | zaváděcí oddíl  
**praŝargebla** = bootable | opstartbaar | démarrable | bootovatelný  
**praŝargi** = boot | (een computer) opstarten | démarrage | bootovat  
**praŝargo per KD-legilo** = CD boot | opstarten vanaf cd-rom | démarrage à partir d'un CD | bootování z CD  
**presebla versio** = print version | afdrukversie | version imprimable | verze pro tisk  
**pri** = about | info over | à propos de | o (programu)  
**procesoro** = processor | processor | processeur | procesor  
**produkto** = product | product | produit | produkt  
**programado** = development | ontwikkeling | programmation | vývoj  
**programaro** = software | programmatuur | logiciel | programové vybavení  
**programi** = develop (program) | ontwikkelen | programmer | vyvíjet  
**programisto** = developer | ontwikkelaar | programmeur | vývojář  
**projekto** = project | project | projet | projekt  
**provizanto de retkonekto** = internet access provider | internetaanbieder | fournisseur d'accès à Internet | poskytovatel připojení k internetu  
**punktoj en colo** = dots per inch | aantal beeldpunten per inch | points par pouce | bodů na palec  
**rajtigi** = authorize | machtigen | autoriser | autorizovat  
**rajtigo** = authorization | machtiging | autorisation | autorizace  
**rapido** = velocity | snelheid | rapidité | rychlost  
**rastrumo** = bit map | rasterafbeelding | image matricielle | bitmapa

**redakti** = edit | bewerken | modifier | upravit  
**redaktilo** = editor (program) | bewerkingsprogramma | éditeur | editor  
**regi** = control | besturing | contrôle | ovládat  
**registri** = burn (CD or DVD) | branden | graver | vypálit  
**reklamrubando** = banner | webvertentie | bannière | reklamní proužek  
**reta administrado** = e-government | e-overheid | administration électronique | eGovernment  
**reta versio** = web version | webversie | version électronique | webová verze  
**retadreso** = internet address | internetadres | adresse internet | internetová adresa  
**retbabilejo** = chat room | babelkamer | clavardoir | chatovací místnost  
**retbabili** = chat | webkletsen | converser | chatovat  
**retbankumado** = e-banking | thuisbankieren | banque électronique | elektronické bankovníctví  
**retbankumado** = electronic banking | elektronisch bankieren | opérations bancaires électroniques | internetové bankovníctví  
**retbutiko** = webshop | webwinkel | boutique en ligne | e-shop  
**retejo** = website | webstek | site web | webové stránky  
**retkomerco** = e-commerce | elektronische handel | commerce électronique | elektronické obchodování  
**retlando** = cyberspace | cyberspace | cyberespace | kyberprostor  
**retlernado** = e-learning | teleleren | apprentissage en ligne | e-learning  
**retmesaĝo** = e-mail (message) | bericht | message (électronique) | e-mail  
**retpoŝta konto** = e-mail account | e-mailaccount | compte de messagerie | e-mailový účet  
**retpoŝtadreso** = e-mail address | e-mailadres | adresse de messagerie | e-mailová adresa  
**retpoŝti** = e-mail | bericht sturen | envoyer un message | poslat e-mail  
**retpoŝtilo** = e-mail client | e-mailprogramma | logiciel de messagerie | e-mailový klient  
**retpoŝto** = e-mail | e-mail | courriel | elektronická pošta  
**retprogramo** = applet | applet | appliquette | applet  
**retropaŝo** = backspace | terugtoets | retour arrière | klávesa Backspace  
**retumejo** = internet café | internetcafé | cybercafé | internetová kavárna  
**retumi** = browse (internet) | surfen | surfer | surfovat  
**retumilo** = browser | webbrowser | navigateur web | webový prohlížeč

**rezigni** = cancel (resign) | afbreken | annuler | storno  
**rubujo** = deleted items folder | map  
 Verwijderde items | dossier Éléments  
 supprimés | koš  
**sago** = arrow | pijl | flèche | šipka  
**sagoklavo** = arrow key | pijltoets | touche fléchée | kurzorová klávesa  
**ŝalti** = check (button) | aanvinken | cocher | zaškrtnout  
**ŝalti** = enable | inschakelen | activer | povolit  
**salutnomo** = user name | gebruikersnaam | nom d'utilisateur | uživatelské jméno  
**ŝargi** = charge (batteries) | opladen | charger | nabít  
**ŝargi** = charge (load) | belasten | charger | nahrát  
**ŝargilo** = charger | lader | chargeur | nabíječka  
**savdosiero** = back-up file | reservekopie | fichier de sauvegarde | záložní soubor  
**savkopio** = backup | reservekopie | sauvegarde | záložní kopie  
**sekurega rompo** = security breach | beveiligingslek | violation de la sécurité | bezpečnostní incident  
**sekva** = next | volgende | suivant | další  
**sencimigi** = debug | fouten opsporen | déboguer | ladit  
**sennoma** = anonymous | anoniem | anonyme | anonymní  
**senvirusigilo** = antivirus program | antivirus-programma | antivirus | antivirový program  
**serĉilo** = finder | finder | finder | vyhledávač  
**servilo** = server | server | serveur | server  
**signo** = character | teken | caractère | znak  
**signaro** = character set | tekencodering | jeu de caractères codés | znaková sada  
**skajpi** = skype | skypen | skyper | skypovat  
**son-** = audio | geluids- | audio | zvukový  
**sondosiero** = audio file | geluidsbestand | fichier audio | zvukový soubor  
**spamo** = spam | spam | pourriel | spam  
**speciala** = advanced | geavanceerd | avancé | pokročilý  
**ŝprucfenestro** = pop-up window | pop-up venster | fenêtré intruse | vyskakovací okno  
**steleto** = asterisk | sterretje | astérisque | hvězdička  
**stirstango** = joystick | joystick | manette de jeu | pákový ovladač  
**ŝtopiĝo** = bottleneck | knelpunt | goulot | d'étranglement | hrdlo láhve  
**streko** = bar (stroke) | streepje | tiret | čárka  
**tabla komputilo** = desktop computer | bureaucomputer | ordinateur fixe / de bureau | stolní počítač  
**tabulkomputilo** = tablet computer | tablet-pc | tablette tactile | tablet  
**taktilo** = clock | systeemklok | horloge |

(systémové) hodiny  
**tasko** = job | taak | tâche | úloha  
**tekokomputilo** = laptop | draagbare computer | ordinateur portable | notebook  
**teleregilo** = remote control | afstandsbediening | télécommande | dálkové ovládání  
**tiparo** = typeface | lettertype | police d'écriture | rodina písma  
**titolo** = title | titel | titre | nadpis  
**tradukejo** = translations application | vertalingsplatform | plateforme de traduction | překladatelský program  
**traĵo** = feature | functie | fonctionnalité | funkcionalita  
**transpasi** = exceed (mailbox quota) | overschrijden | dépasser | překročit  
**trejnado** = training | training | apprentissage | školení  
**tujmesaĝilo** = instant messenger | instant messenger | messagerie instantanée | program pro posílání instantních zpráv  
**tuŝekrano** = touchscreen | aanraakscherm | écran tactile | dotyková obrazovka  
**tutekrano** = full-screen | schermvullend | plein écran | celoobrazovkový  
**usklecodistinga** = case sensitive | hoofdlettergevoelig | sensible à la casse | citlivý na velikost písmen  
**uzanto** = user | gebruiker | utilisateur | uživatel  
**vakigi** = clear | leegmaken | effacer | vyprázdnit  
**validigi** = validate | valideren | valider | potvrdit  
**vidigi** = display | afbeelden | afficher | zobrazit  
**vikio** = wiki | wiki | wiki | wiki  
**Wikipedio** = Wikipedia | Wikipedia | Wikipédia | Wikipedie  
**Vindozo** = Windows | Windows | Windows | Windows  
**viŝebla** = erasable | wisbaar | effaçable | vymazatelný  
**viŝebla KD** = CD rewritable | herschrijfbaar cd | disque compact réinscriptible | přepisovatelné CD  
**viŝi** = erase | wissen | effacer | vymazat  
**vitrofibro** = fiberglass | glasvezel | fibre de verre | skleněné vlákno  
**viva KD** = live CD | live CD | CD autonome | live CD  
**vortaro** = dictionary | woordenlijst | dictionnaire | slovník  
**zono** = area | gebied | aire | oblast

# Parto 3

bildoj kaj klarigoj



### Komputila klavaro (keyboard)

- 01 eniga klavo (enter)
- 02 majuskliga klavo (shift)
- 03 spacostango (space bar)
- 04 majuskla baskulo (caps lock)
- 05 funkcia klavo (function key)
- 06 stirklavo (control key)
- 07 opcia klavo (option key)
- 08 komanda klavo (command key)
- 09 foriga klavo (delete button)
- 10 eskapa klavo / ordon-nuliga klavo (escape key)




**Komputila muso** estas dialoga flankaparato kiun la uzanto movas (fakĵargone: trenas) sur horizontala ebena (ekzemple sur sia tablo, prefere kovrita per musmato), tiel movante musindikilon sur komputila ekrano. La elekto de la montrata pozicio kaj de la responda opcio indikita per piktogramo estas farata per premo ("klako") sur klavon provizitan sur la muso. Jen muso de Microsoft kun du butonoj.




Lasera presilo/printilo



Inkŝpruca presilo/printilo



Nadlara presilo/printilo




### Tabla komputilo (desktop computer)

- 1 ekrano
- 2 ĉeftabulo
- 3 procesoro
- 4 ĉefmemoro
- 5 etendila karto
- 6 nutro
- 7 lumdiska legilo
- 8 fiksita disko
- 9 klavaro
- 10 muso

### Fontoj de la bildoj:

<http://commons.wikimedia.org/wiki/File%3ALaserJet1012.jpg> CC-BY-SA Stehfun  
[http://commons.wikimedia.org/wiki/File%3ACanon\\_S520\\_ink\\_jet\\_printer.jpg](http://commons.wikimedia.org/wiki/File%3ACanon_S520_ink_jet_printer.jpg) CC-BY-SA André Karwath aka Aka  
[http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Epson\\_MX-80.jpg](http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Epson_MX-80.jpg) CC-BY-SA Nakamura2828 at us.wikipedia  
[http://commons.wikimedia.org/wiki/File:3-Tastenmaus\\_Microsoft.jpg](http://commons.wikimedia.org/wiki/File:3-Tastenmaus_Microsoft.jpg) CC-BY-SA Darkone  
[http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Personal\\_computer\\_exploded\\_5.svg](http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Personal_computer_exploded_5.svg) CC-BY-SA Gustavb  
<http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Joyopis.svg> CC-BY-SA Piotr Michał Jaworski; Poland/Poznań  
[http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Hdd\\_od\\_srodka.jpg](http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Hdd_od_srodka.jpg) PD Rjt  
[http://commons.wikimedia.org/wiki/File:RAM\\_n.jpg](http://commons.wikimedia.org/wiki/File:RAM_n.jpg) CC-BY-SA Topory  
[http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Asus\\_a8n\\_VMCSM.jpg](http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Asus_a8n_VMCSM.jpg) GFDL 1.2 Fir0002/Flagstaffotos  
[http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Audio-Technica\\_ATH-A500.jpg](http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Audio-Technica_ATH-A500.jpg) PD RadioActive  
[http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Philips\\_SBC\\_MD\\_110.jpg](http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Philips_SBC_MD_110.jpg) CC-BY-SA Felipe Micaroni Lalli  
[http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Soleil\\_et\\_ombre\\_sur\\_un\\_bouquin\\_%C3%A9lectronique\\_iLiad.jpg](http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Soleil_et_ombre_sur_un_bouquin_%C3%A9lectronique_iLiad.jpg) PD Martouf  
[http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Intel\\_80486DX2\\_bottom.jpg](http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Intel_80486DX2_bottom.jpg) CC-BY-SA Andrew Dunn  
<http://en.wikipedia.org/wiki/File:1stGen-iPad-HomeScreen.jpg> © Apple Inc. (foto: Evan-Amos)  
[http://commons.wikimedia.org/wiki/File:ATI\\_RADEON\\_9800XXL.jpg](http://commons.wikimedia.org/wiki/File:ATI_RADEON_9800XXL.jpg) CC-BY-SA Darkone



### Stirstango (joystick)

- 1 tenilo
- 2 piedo
- 3 pafbutono
- 4 kromaj butonoj
- 5 rapidpafa baskulo
- 6 akcelilo
- 7 vidpunkta turnilo
- 8 suĉtenilo

## Kelkaj ekzemploj el Vikipedio

### Amasmemoro (mass storage)



Amasmemoro memoras programojn kaj datumojn sen energio. La plej ofte uzata formo de amasmemoro en personaj komputiloj estas diskaparato (ankaŭ nomata "durdisko"). Persona komputilo povas esti etendita per la aldono de diskaparatoj aŭ lumdiskoj, se la amasmemoradaptilo provizas etendeblecon. La uzanto povus ekzemple aldoni diskaparatojn kaj lumdiskojn. Normaj internaj memoraranĝaj interfacoj estas ATA, Serial ATA, SCSI kaj CF+ Type II.

### Cimo (bug)

Cimo (aŭ program-eraro) estas eraro, manko aŭ misfunkcio ĉe komputila programo, kiu malebligas la intencitan kondutmanieron de la programo. Preskaŭ ĉiu komputila programo de ioma amplekso enhavas cimojn. Plej multaj cimoj ne estas gravaj por la funkciado de la programo aŭ aperas nur en tre specifaj, maloftaj, kazoj. Provi forigi cimojn de komputila programo nomiĝas "sencimigi". Speciala programaro, "erarserĉilo", povas helpi trovi kaj forigi cimojn. Ofte tiucele ekzistas aparta "sencimiga reĝimo" de la programo. La plej konata cimo estas "la Problemo de jaro 2000". Ofta cimo estas "bufra troo".


### Ĉefmemoro (RAM)



La ĉefmemoro estas rapida memoro senpere adresebla de la ĉefprocesoro. Ĝi estas uzata por memori la plenumatajn programon kaj datumon. Personaj komputiloj uzas duonkonduktan service atingeblan memoron kiel DRAM aŭ SRAM. La ĉefmemoro estas

kutime multe pli rapida ol amasmemoro kiel diskaparato aŭ lumdisko, sed ĝi ne povas teni datumojn sen energio kaj estas pli multekosta ol amasmemoro.

### Ĉeftabulo (motherboard)



La ĉeftabulo estas la ĉefa cirkvita tabulo de persona komputilo. Multaj aliaj partoj estas konektitaj rekte aŭ nerekte al la ĉeftabulo. Sur la ĉeftabulo kutime estas muntitaj unu aŭ pluraj procesoroj, subtenaj cirkvitoj, ĉefmemoro kaj cirkvitoj helpantaj dum la komenca agordo post la enŝalto (BIOS). En multaj porteblaj komputiloj la ĉeftabulo enhavas kutime ĉiujn kernajn partojn. Ofte la funkcio de la ĉeftabulo estas etendebila per aldonaj cirkvitaj tabuloj (aldonaj tabuloj).


### DVD

DVD estas disko kiu entenas informojn pere de cifereca registrosistemo simila al tiu de KD. Tiuj diskoj havas diametron de 12 cm, same kiel KD, sed havas pli grandan datumspacon – ĉe ambaŭ flankoj de la disko kaj ĉe ĉiu en du tavoloj – sume ĝis 9 GB. La mallongigo DVD ne havas oficialan longan formon. Oni origine proponis ĝin kiel mallongigon de la angla Digital Versatile Disc (Diĝita Variuza Disko). En Esperanto oni ofte parolas pri "lumdiskego", ĉar ĝi havas pli grandan datumspacon ol lumdisko (KD). Tamen, kelkaj opinias ke tio estas misuzo de la sufikso -eg. Kiam DVD estas uzata por konservi videon, oni foje ankaŭ nomas ĝin "viddisko".



### Elektronika papero (e-paper)

Elektronika papero aŭ e-papero estas ekran-teknologio fasonita por imiti la aspekton de ordinara inko je papero. Male al konvencia plata panelo-ekrano, kiu uzas kontraŭlumon por prilumi siajn bilderojn, elektronika papero reflektas lumon kiel ordinara papero kaj estas kapabla teni tekston kaj bildojn senfine sen uzi elektron, permesante al la bildo esti ŝanĝita poste. Por konstrui e-paperon, pluraj malsamaj teknologioj ekzistas. E-papero ebligas pli komfortan legadon ol konvenciaj ekranoj pro la stabila bildo, kiu ne devas esti refreŝigata konstante, la pli larĝa spektado-angulo, kaj la fakto ke ĝi reflektas ĉirkaŭan lumon prefere ol elsendi propran lumon. E-paperekrano povas esti legata en rekta sunlumo sen ke la bildo malintensigās.



### Kapaŭskultiloj (headphones)



Kapaŭskultiloj aŭ kapaŭdiloj estas paro de transduktiloj, kiuj ricevas elektran signalon el muzika aŭ sona ludilo aŭ ricevilo kaj uzas laŭtparolilojn proksime de la oreloj por konverti la signalon en aŭdeblajn sonondojn. Oni uzas la aparaton ankaŭ por malebligo de aliro de bruego en la orelojn, do la aparato servas kiel ŝirmilo de aŭdkapablo, ekz. en bruega medio.

Ekzistas la jenaj specoj de aŭskultiloj:

- Kapaŭskultiloj fermitaj
- Kapaŭskultiloj malfermitaj
- Kapaŭskultiloj orelalkroĉaj
- Kapaŭskultiloj orelŝtopaj



### Laŭtparolilo (loudspeaker)

Laŭtparolilo estas elektromeĥanika ilo kiu transformas elektran signalon en sonon.

### Mikrofono (microphone)

Mikrofono estas aparato, kiu transformas sonenergiecon al elektra energio, kiu havas similajn ondoproprecojn kiel la sono. Ĝi transformas sonondojn (premŝanĝojn de aero) al simile ŝanĝiganta elektra kurento. Tio okazas en du paŝoj. Unue la son-ondo trafas elastan surfacon, membranon, kiu komencas oscili. La moviĝo de la membrano ekas similajn ŝanĝojn en la elektra cirkvito. Laŭ tipo de la mikrofono, je moviĝo de la membrano, ŝanĝiĝas ankaŭ rezisto de karbonkonektilo (karbonmikrofono), aŭ kapacito de kondensatoro (kondensatormikrofono), aŭ bobeno en magneta kampo (dinamika mikrofono) aŭ moviĝo de kondukto (rubandomikrofono), aŭ tordiĝas aŭ kliniĝas piezoelektra kristalo (kristalmikrofono). La moviĝo de la membrano ĉiukaze indukas ŝanĝiĝojn en la elektra eliro. Per konvena konstruo, la sentemo de la mikrofono estas influebla, tiel ĝi povas kapti sonojn nur de unu-du direktoj (direkta mikrofono), aŭ de ĉiuj direktoj kun sama sentemo (globkarakterata mikrofono).






## Operaciumo (operating system, OS)

En komputiko, operaciumo, ankaŭ nomata "mastruma sistemo", estas speciala programaro, sen kiu ne eblas uzi plispecifajn programarojn. Ĝi oficas kiel "bazo", al kiu aliaj programaroj apogiĝas, kiuj do devos esti projektataj por tiu operacio, alie ili ne estos rekonataj. Laŭ pli serioza difino, operaciumo estas aro de subrutinoj kaj strukturo de datumoj respondecaj pri la kontrolo kaj administrado de komputilaj aparatoj kaj de programaroj, kiuj estas rulataj sur la komputilo. Kutime, operaciumo antaŭaranĝas por la uzanto grafikan aŭ tekstan interfacon por atingi la aparataron (diskoj, memoro, I/O) de la sistemo. En sistemoj kun pluruzanto-reĝimo, tia atingo dependas de la rajtoj de ĉiu unuopa uzanto. La ĉefa tasko de la operaciumo estas permesi al la uzanto, homa aŭ ne, rekte interagi kun la maŝino.

## Procesoro (processor)



La procesoro estas la parto de la komputilo, kiu plenumas la programojn, ankaŭ la operaciumon. Preskaŭ ĉiuj personaj komputiloj enhavas specon da procesoro konatan kiel mikro-procesoro. IBM-kongruaj komputiloj uzas x86-kongruan procesoron, kutime produktitan de Intel, AMD, VIA aŭ Transmeta. Apple-komputiloj komence estis konstruitaj per la serio 68000 de Motorola, poste PowerPC kaj ekde 2005 Apple uzas x86-kongruajn procesorojn de Intel.

## Tabulkomputilo (tablet pc)



Tabulkomputilo estas tabulforma portebla komputilo kun tuŝekrano, kiu estas laŭ sia grandeco kaj funkcia komplekso inter poŝkomputilo kaj tekokomputilo. Oni kutime uzas surekranan virtualan klavaron anstataŭ materialan klavaron por enigi datumojn en ĝin. En la jaro 2000 Mikrosofto surmerkatis komputilon nomatan "tabula personkomputilo" (angle "tablet personal computer"), kiu tamen ne estis granda sukceso. La unua tabulkomputilo en la nuna senco de la vorto estis la iPad de Apple, surmerkatis en aprilo 2010.


## USB-poŝmemorilo (memory stick)

Poŝmemorilo aŭ populare "memorbastoneto" estas eta flankaparato, kiun oni povas uzi kiel ekstran facile interŝanĝeblan memoraparaton por sia komputilo. Ĝi uzas fulmmemoron kaj USB-konektilon. USB-memoriloj elektre nutriĝas per la USB-konekto al komputilo, ĉe kiu la memoro konektiĝas.



## Vidkarto (video card)

La vidkarto aŭ grafika karto bildigas la grafikan eligon de la komputilo al la komputila ekrano kaj estas esenca parto de moderna komputilo. En malnovaj komputiloj grafikaj kartoj estis integritaj en la ĉeftabulo, sed pli ofte ili uzas busan sistemon kiel PCI, AGP aŭ PCI Express. Kiam la IBM PC estis enkondukata, multaj personaj komputiloj uzis nurtekstan eligan adaptilon kaj havis nenian grafikan kapablon.



# Parto 4

## pri ĉapelitaj literoj

### Surogataj sistemoj

Ĉar la Esperanta alfabeto havas supersignojn, diversaj surogataj sistemoj estas uzataj. Multaj klavaroj ne havas ĉapelitajn literojn kaj la uzanto ne havas (aŭ ne scias) bonan metodon por enigi tiajn literojn. Kvankam programaro ekzistas por facile enigi ĉapelitajn literojn en komputilon, oni ankoraŭ devas uzi surogatajn literojn en programaro kiu nur traktas tekston en la formatoj ASCII aŭ ISO-8859-1 (Latin-1).

Ĉefaj surogataj sistemoj estas:

- H-sistemo
- X-sistemo
- ^-sistemo
- `-sistemo

El la diversaj surogataj skribosistemoj nur la H-sistemo estas difinita en la Fundamento de Esperanto, la baza regularo de Esperanto. La Akademio de Esperanto tamen en 2007 permesis la uzon de aliaj surogataj skribosistemoj, se ĝi estas nura teknika rimedo necelanta ortografian reformon, kiam la cirkonstancoj ne permesas uzi la ĝustajn supersignojn kaj uzo de la H-sistemo ne estas oportuna (precipe ĉar en ĝi ambaŭ "u" kaj "ŭ" fariĝas "u").

Pro evoluo de komputilaj sistemoj nuntempe ne plu estas granda bezono uzi surogatajn skribmetodojn por skribi Esperanto-literojn. Preskaŭ ĉiuj programoj subtenas Unikodon. Tamen multaj plu preferas tajpi uzante H aŭ X-sistemon, kiuj estas aŭtomate konverteblaj en la ĝustajn ĉapelitajn E-literojn.

### Konverti tekstojn

Se vi ricevas tekston skribitan en surogata sistemo, vi povas tiun konverti ekzemple per la unikoda konvertilo en la retejo [www.komputeko.net](http://www.komputeko.net)




Ekzistas ankaŭ makrooj por fari tian konvertadon en OpenOffice.org kaj LibreOffice. Klarigojn pri tio vi trovos en la retejo de Bertilo Wennergren <http://bertilow.com>

### Tajpi ĉapelitajn literojn en Vindozo: Ek

La plej populara vindaĵo programo por tajpi ĉapelitajn literojn estas Ek, implementita de Jurij Finkel. Ek estas programo kiu permesas tajpi Esperantajn ĉapelitajn literojn en ĉiuj vindaĵoj

programoj, ĝuste subtenantaj Unikodon (kiel Word, Outlook, Internet Explorer, Mozilla kaj aliaj), kaj eventuale en aliaj programoj, permesantaj enmeton en signaro Latina-3.

Ek funkcias sub Vindozo 95/98/ME kaj Vindozo NT4/2000/XP/Vista. Ĝi permesas uzi prefiksajn kaj sufiksajn modifajn klavojn por enmeto de ĉapelitaj literoj, kaj ankaŭ atribui ĉapelitajn literojn rekte al certaj klavoj. Bildsimbolo de EK ĉiam rezidas en la sistema taskopleta, kaj vi povas aktivigi aŭ malaktivigi Ek-on, klakante sur la bildsimbolo per maldekstra musbutono. Vi povas ankaŭ, klakante per dekstra musbutono, voki menuon, kiu ebligas voki la agordofenestron, voki helpon aŭ haltigi la programon. Ek estas elŝutebla de la retejo <http://tinyurl.com/ekesperanto>



### Interesa aternativo por EK: Tajpi

Se vi spertas problemojn kun EK aŭ simple volas provi alian programon por tajpi ĉapelitajn literojn en via vindaĵo komputilo, pripensu uzi Tajpi de Thomas James. Informojn vi trovos en la retejo <http://tajpi.webhop.net>

### Tajpi ĉapelitajn literojn en Makintoŝo: ne per programo, sed klavararanĝo

Sur Makintoŝaj komputiloj kun OS X vi povas tajpi Esperantajn supersignojn per la provizita klavararanĝo (ankaŭ nomita "klavarfasono") U.S. Extended kaj per diversaj elŝuteblaj aranĝoj.

### La "vastigita" klavararanĝo U.S. Extended

De la "Apple"-menuo (ĉiam supre maldekstre sur la ekrano) vi elektu "System Preferences" kaj poste "Language & Text". Sub la langeto "Input menu" vi ŝaltu "U.S. Extended". Estas konsilinde ankaŭ difini fulmklavon por baskuli inter la klavararanĝoj (ekz. ctrl-alt-cmd-space), kaj ŝalti "Show input menu in menu bar". Se vi ŝaltas ankaŭ "Keyboard viewer" (supre de la listo de naciaj klavaroj) tio helpas kompreni kion faros la diversaj klavkombinoj. Por tajpi "eĥoŝanĝo ĉiujajde", vi tajpu alt-6 sekve de h/s/g/ktp por la ĉapeloj, kaj alt-b sekve de u por la ŭ.

Por tajpi Esperanton bone funkcias ankaŭ la vastigita norvega klavaro. Bonan version de tiu klavaro eblas elŝuti de la retejo de Jardar: <http://jardar.nvg.org/mac/tastatur/index.html>

### Elŝuteblaj klavararanĝoj: alt-metodo

La supra solvo nur funkcias por komputiloj kun qwerty-klavaroj. En la retejo <http://www.alaska.net/~johano/mac-eo-keylayouts/klavar.html> mi trovis elŝuteblajn klavararanĝojn de Jaz Brown kiuj estas uzablaj por azerty- kaj qwerty-klavaroj.

- 1) elŝutu USEsperanto.zip (kopion vi trovos en [www.komputeko.net](http://www.komputeko.net))
- 2) malfermu la dosieron "U.S. Esperanto" kaj kopiu "Esperanto.bundle" al

- Macintosh HD\Library\Keyboard Layouts (angle)
- Macintosh HD\Bibliotheek\Keyboard Layouts (nederlande)
- Macintosh HD\Bibliothèque\Keyboard Layouts (france)

- 3) restartigu vian komputilon
- 4) iru al "System Preferences" (nl: systeemvoorkeuren, fr: préférences système) kaj elektu "Language & Text" (nl: Landinstellingen, fr: Langue et texte)
- 5) alklaku la langeton "Input Sources" (nl: invoermenu, fr: méthodes de saisie)
- 6) ŝaltu la opcion "Show input menu in menu bar" (nl: toon invoermenu in menubalk, fr: afficher le menu Saisie dans la barre des menus)
- 7) ŝaltu "French Esperanto" por azerty-klavaro kaj "U.S. Esperanto" por qwerty-klavaro
- 8) fermu la agordaron "System Preferences"
- 8) elektu "French Esperanto" aŭ "U.S. Esperanto" en la falmenuo apud la horindiko dekstre supre

Jen ĉio! Nun vi povas uzi ĉapelitajn literojn en via Makintoŝa komputilo uzante alt+[la litero], ekzemple alt+c por "ĉ" kaj alt+g por "ĝ".

*Atentu: la solvo estas por francaj azerty-klavaroj. Kelketaj klavoj, kiel la @-signo troviĝas en alia loko en alilandaj azerty-klavaroj. Konkrete por belga azerty-klavaro @ temas pri la klavo kun la £-signo: alt+`.*

#### **Elŝuteblaj klavararanĝoj: x-metodo**

Kalle Kniivilä instalis klavararanĝon kiu ĉapeligas dum li tajpas "ikse". Eblas preni la klavaron ĉi tie: <http://www.kniivila.net/tenejo/ESF-klavaro.zip>

"ESF" estu interpretata kiel Esperanta-Sveda-Finna. Ĝi estas do bazita sur la finna-sveda klavaro, kiu enhavas la literojn ÅÄÖ sur apartaj klavoj dekstre de L. Vi povas eventuale mem adapti la klavararanĝon per la senpaga programo Ukelele. Informojn vi trovos en la retejo <http://scripts.sil.org/ukelele>

#### **Ĉapelitaj literoj en Linukso: sufiĉas agordi**

Por bone uzi Esperanton en Linukso, necesas iom da agordado de la sistemo. Ekzemple necesas, ke la sistemo uzu unikodan lokaĵaron.

Pluraj Linuksaj distribuoj (precipe tiaj, kiuj baziĝas sur "Debian", ekz. "Ubuntu" kaj "Kubuntu") nuntempe jam enhavas pretan Esperantan klavararanĝon. Se vi instalas ĉiujn bezonatajn pakaĵojn por Esperanta lingvosubteno, tiam tiu klavararanĝo jam devas esti elektebla.

En la retejo de Bertilo Wennergren <http://bertilow.com> vi trovos detalajn informojn pri pluraj distribuoj de Linukso.

## Parto 5

### helposignoj

+	plus-signo
-	minus-signo / dividostreko
=	egalo-signo
&	kaj-signo
§	paragraf-signo
%	elcento-signo
?	demando-signo
!	kri-signo
.	punkto
:	dupunkto
;	punktokomo
...	tripunkto
—	haltostreko
/	suprenstreko
\	malsuprenstreko
*	steleto / asterisko
'	apostrofo
“	citilo
()	rondaj krampoj
[]	rektaj krampoj
<>	angulaj krampoj
{}	kunigaj krampoj
@	heliko prononco: ĉe

Q q	kuo
W w	duobla vo, ĝermana vo, vavo prononco de "www": vavo, vavo, vavo
X x	ikso
Y y	ipsilono

Komputeko estas mallongigo de **prikomputila terminokolekto**. En tiu ĉi dua eldono aperas 7.800 komputil-rilataj kapvortoj en la usonangla lingvo kun traduko al Esperanto. Kompare kun la unua eldono estas pli ol 500 aldonoj kaj modifoj.

Troviĝas en tiu ĉi verko ankaŭ kelkpaĝa multlingva vortareto (usonangla, nederlanda, franca, ĉeĥa) kun kapvortoj en Esperanto kaj kelkaj paĝoj kun bildoj kaj klarigoj.

Komputeko ne celas anstataŭi ekzistantajn iniciatojn (kiel Komputada Leksikono kaj ReVo), sed male ilin plifortigi, plifaciligante la aliron al diversaj fontoj kaj komparante elektojn kaj proponojn de diversaj vortaroj.

La projekto Komputeko volas — en Esperanto, sed ankaŭ en aliaj lingvoj — stimuli ĝustan lingvouzon kaj kontraŭi la uzadon de (ofte fuŝa formo de) usonangla termino. Mi rimarkis ke tre ofte esperantistoj uzas anglajn vortojn kiam ili parolas pri komputil-rilataj aferoj, simple ĉar ili ne konas, nek facile trovas taŭgajn tradukojn en Esperanto. La vortoj ekzistas; vi ilin trovas en tiu ĉi libreto.

Jenaj tradukteamoj konfirmis uzi la Komputecon kiel unu el la ĉefaj fontoj por sia tradukado: Drupal (Chuck Smith), Ipernity (Paul Peeraerts), Facebook, OpenOffice.org (Tim Morley), Firefox (Eduardo Trápani), KDE, Joomla kaj liberaprogramaro.net (Cindy McKee).

Aĉetu tiun ĉi libron ne nur ĉar vi trovos en ĝi fidindajn tradukojn el praktiko por prikomputilaj terminoj, ne nur ĉar vi volas subteni la projektojn de la organizo E@I, ne nur por kompletigi vian kolekton de Esperanto-vortaroj, sed ankaŭ por uzi ĝin kiel varbilon; por montri al neesperantistoj bonkvalite presitan pruvilon ke Esperanto estas moderna lingvo per kiu eblas absolute ĉion esprimi.

[www.komputeko.net](http://www.komputeko.net)

Komputeko estas nemalhavebla praktike orientita verko. Ĝi estas riĉa kaj ĝisdata fonto de terminoj de tre aktuala kaj rapide evoluanta fako.  
*Bertilo Wennergren, Direktoro de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro en la Akademio de Esperanto.*

Por revuo kiel Monato, kiu traktas tre aktualajn temojn, mi nepre bezonas fidindajn ĝisdatajn terminarojn. Komputeko plene respondas al tiu bezono.  
*Paul Peeraerts, administra sekretario de Monato.*